



Esperanto
Societo
Frankfurto



Esperanto-Informilo




Foto: E. Bünemann, la 20-an de septembro. "Saluton! Hodiaŭ estas tago de la publike aperaj konstruejoj. Ni ĵus finvizitis la konstruejon por subtertrajna haltejo Güterplatz, tunelo, kaj rampo. Impresa!

Mesaĝo de la prezidanto: La arbitre kaj desupre fiksita germana reunuiĝotago, 3-a de oktobro, falas ĉi-jare sur vendredo kaj donacas al ni longan semajnfino. Nun, eble la elektita tago mem ne tiel gravas - gravas ja pli ke ni rememoru la dividon de la du germanaj ŝtatoj per muro kaj pikdrato kaj la iaman malliberecon kaj gvatadon en la orienta parto. Neforgesante la mirinde pacecan reunuiĝon. Legu pli pri la hodiaŭa tago en la esejo de U. Fellmann

G. Hennemann, 3-an de oktobro 2025

Oktobro

2025

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:

Georg Hennemann

Ulrich Fellmann

Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann

Rehgartenstrasse 16

35683 Dillenburg

Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: BE92 9051 1007 7223

BIC: TRWIBEB1XXX

bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Unua mardo

La 7-an de oktobro 2025
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Dua mardo

La 14-an de oktobro 2025
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 21. Oktober, 2025 --- Mardo, la 21-an de oktobro, 2025

18:30 h

Sprachrunde

Lingva Rondo

“Rätsel - Enigmoj”

Gundhild Schäfer

19:30 h

Vortrag

Prelego

“Genro⁴, sekso, kaj kulturbatalado.”

Kiom da sentitaj genroj, kiom da biologiaj seksoj ekzistas, kaj kial tio nun tiom gravas?
Ĉu nia hodiaŭa socio pri tiu temo iĝis malpli tolerema ol estis nia socio antaŭ kvindek jaroj?”

U. Fellmann

Mardo, la 28-an de oktobro, 7pm

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurt je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

Anoncoj:



La elstara mapo : sendita de S. Bremser

“Tiu mapo troveblas en vikipedio. Ĝi montras kie en Eŭropo ekzistis Esperantogrupoj en la jaro 1905. (Laŭ vikipedio ĝi estis eĉ farita de la Frankfurta grupo en 1905.)

Mi estas iomete skeptika ĉar ekzemple Nurenbergo mankas. Kion vi pensas? Ĉu estas findinda historia dokumento pri la disvastiĝo de Esperanto?”

Eseo - Pensoj pri la germanuja reunuiĝotago

De Felmano Ulriko

Imagu, ke lando havus nacian festotagon, en kiu okazis gravaĵo, farita de la popolo, kiu tre influis, ja, ŝanĝegis la vivkondiĉojn en tiu lando. Tiel estas en preskaŭ ĉiuj landoj. Ekzemple en Francujo, oni festas la Francan Revolucion, kaj pro tio elektis la daton de la konkero de la Bastilo. Kaj imagu, ke lando havus nacian festotagon, en kiu okazis tielrilate - nenio. Kiel estas rilate la 3-a de oktobro 1990 en Germanujo. Nu, ne estis, ke ekzakte tiam okazis nenio. La tiama kanceliero de la Federacia Respubliko Germanujo subskribis juran dokumenton. Por li mem tiu estis tago de triumfo. Sed por ordinaraj homoj, la t.n. popolo, rilate sia vivo tiutage okazis nenio. Neniu reala ŝanĝiĝo okazis, neniu heroa aŭ videbla grava, influa, rimarkinda ago estis videbla. Vi eble jam spektis filmojn pri la Franca Revolucio. Imagu filmon pri la 3-a de oktobro 1990 en Germanujo. Helmut Kohl sidas je tablo kaj skribas "Helmut Kohl". Mi ne bezonas diri pli.

Deklari tiun tagon de burokratia proceduro esti la nacia tago de la popolo estas miaopinie plorinda afero. Kaj estas forĵetita eblo, neuzita ŝancego. Ĉar troviĝas dato, kiu ne nur estas la natura, evidenta, pli bona tago de nacia tago de cerebro, sed eĉ elstare bona, ĉar ĝi estas eĉ superaveraĝe taŭga kaj inda, apenaŭ nekredeble riĉa kolekto de datoj, kiuj respegulas la nacian historion, ĉar dum tiuj datoj okazis gravegaj, parte bonegaj, parte malbonegaj historiaĵoj, kiuj ege influis la nacian historion kaj aŭ ankaŭ la spertebajn vivkondiĉojn. Filmo pri tiuj eventoj povus facile esti longega.

Mi parolas pri la 9-a de novembro.

Ankaŭ la germanlingva Vikipedio skribas: "Auf den 9. November fällt eine Reihe von Ereignissen, die

für die jüngere deutsche Geschichte als politische Wendepunkte mit teilweise auch internationalen Auswirkungen gelten." t.e. "La 9-an de novembro okazis serio da eventoj konsiderataj politikaj turnopunktoj en lastatempa germana historio, el kiuj kelkaj ankaŭ havis internaciajn konsekvencojn."

Je 9-a de novembro tielrilate okazis i.a. la jenaj socirilataj kaj politikaj aferoj:

1848, Robert Blum, parlamentano de la Frankfurtmajna Paulskirche, estis mortpafita en Vieno fare de kontraŭrevoluciaj trupoj. La evento markis la komencon de la fino de la pordemokratia tiel nomata Marta Revolucio en la ŝtatoj de la Germana Federacio. "Mi mortas por libereco" estis liaj lastaj vortoj.

1918, la germanuja Imperiestro estis abdikigita, kaj Phillip Scheidemann deklaras Germanujon esti respubliko.

1922, Albert Einstein ricevis la Nobelpremion pri fiziko. Estas simbolo por tempo, en kiu Germanujo estis la science gvida lando en la mondo, kaj kiun gravan rolon tiam judoj en Germanujo ludis, precipe en la sciencoj, sed ankaŭ en la sferoj de kulturo kaj ekonomio.

1923 okazis la kontraŭrespublika nesukcesa puĉo de Hitler kaj Ludendorff en Munkeno. Adolf Hitler estis poste enprisonigita kaj en la malliberejo skribis sian influan libron "Mein Kampf", mia batalo.

1938 okazis la tielnomata "Kristallnacht", tutgermanuja detruado de judaj sinagogoj kaj aliaj judaj konstruaĵoj kaj domoj.

1989 estis la rompotago de la Berlina Muro, la vera simbolo por la sekva Germanuja reunuiĝo.

Konklude, la 9a novembro estas la vera naciistoria tago de Germanujo.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Onklo: - Thomas, ĉu vi ankoraŭ volas iĝi profesia futbalisto?

Thomas:- Ne plu, ekde mi eksciis, ke post ĉiu ludo oni devas preni duŝon.

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu temas pri tempopaso kaj pasemco. En Germanio ni konas proverbon kiu pritraktas la temon iomete humore: Mi citas el la memoro: „La tago pasas, la tempo forglitas, kiel rapi-de nenio estas farata.“ (origine: „Der Tag vergeht, die Zeit verrinnt, wie schnell ist nichts getan.“)

[zam-636.01] Matenas, vesperas — kaj tago malaperas

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0636.htm

Enigmo

De Felmano Ulriko

Hodiaŭ mi volas denove prezenti enigmon. Temas pri historirilata demando. Antaŭnelonge, hispana Esperantisto el la urbo Alteo raportis pri loka festo nomita "Maŭroj kaj Kristanoj" (https://es.wikipedia.org/wiki/Moros_y_cristianos). En Alteo oni festas la venkon de kristanoj super la nordafrikaj islamanoj, kiuj ja dum kelkaj jarcentoj regis en la Ibera duoninsulo. La menciita hispana Esperantisto montris videon pri tiu festo, en kiu oni povas spekti kiel multaj kostumitaj personoj sur la strato per malnovstilaj pafiloj multe pafas kaj ludas la konkeron de la Maŭra vilaĝo fare de la kristanoj. Ili tiom multe pafas, ke la aero estas plene da fumo.

Nun la demando: Kio en tiu festo kajaŭ rakonto estas neebla malĝustaĵo?

Pri la nomo de nia majstro

De Felmano Ulriko

Ĉiuj Esperantistoj scias, ke Zamenhof nomiĝis Ludoviko. Li mem ofte subskribis per "L. Zamenhof". Malmultaj scias, ke tiu persona nomo Ludoviko estas de li mem kreita nomo, kaj ne la naskiĝnomo. En Rusujo tiam estis kutimo, elekti novan personan nomon, kiam oni ŝanĝiĝis de junula al plenkreskula vivo. Tiu kutimo eĉ pli ofte estis sekvata de judoj, ĉar ili ofte volis ekuzi nejudan personan nomon, kiam ili iris en alian urbon por lerni profesion aŭ studi en universitato.

Pri tio ankaŭ rakontas la komikso pri la vivo de Zamĉjo, kiu ekkreiĝis antaŭ kelkaj jaroj en la reto. Jen la tielrilata bildo el ĝi:



Ankaŭ ne multaj Esperantistoj scias, ke la gepatra lingvo de Zamenhof estis la rusa, kiu estis la sola lingvo, kiun la patro kun la familio parolis. Tamen, krome, la patrino kun la infanoj parolis ankaŭ la jidan lingvon. La infano Zamenhof do flue parolis la rusan kaj la jidan lingvojn. La polan lingvon li eklernis nur iomete kiam li estis ĉ. 17 jarojn aĝa, do ĉirkaŭ dum la sama tempo kiam li prenis novan antaŭnomon. En Bialistoko (tiam nomita Belostok, laŭ la belorutena lingvo) ja la poloj estis nur eta minoritato. 60% de la loĝantaro estis judoj, sekvis nombre belorutenoj, prusoj (tiam en Rusujo la nomo por germanlingvanoj), poloj, litovoj, kaj rusoj. Zamenhof forlasis Belostokon por studi medicinon en Moskvo (kaj tie laboris por rusa gazeto), iam transloĝiĝis de Moskvo al Minsko kaj poste al Varsovio. Tiam li pli lernis la polan lingvon, estis kvazaŭ lia sesa lingvo. Malgraŭ vivanta en la poste ontanta Polujo regurbo, li neniam ricevis polan ŝtatanecon. Zamenhof ja mortis en 1917, kaj Polujo kiel ŝtato nur fondiĝis poste, en 1919.

Eble ankaŭ interesas, kiujn oficialajn personajn nomojn Zamenhof havis antaŭ sia novnomado.

Lia naskiĝnomo laŭ la rusa dokumento estis Lejzer Markoviĉ Zamenhof.

Laŭ la juda dokumentado, lia nomo estis Eliezer Levi Samenhof.

Lejzer kaj Eliezer estas modernaj formoj de la biblia hebrea nomo El'azar, kies mezepoka latina formo estas Lazarus. Markoviĉ estas laŭ la rusa kutimo indiko de la patronomo, Marko.

Lasta Paĝo.

Esperantlingvaj kromnotoj
De Felmano Ulriko

Post kvinjara laboro, antaŭ kelkaj semajnoj en la Interreto aperis nova Plena Ilustrita Vortaro! Ĉe tiu PIV 2025 temas tamen pri testversio. Oni povas uzi ĝin paralele al la ĝisnune rete havebla PIV 2020, kiu ankoraŭ restas la normala PIV. La novan oni povas tamen uzi kaj kritiki, informi la redakcion pri eblaj eraroj ktp. Ĝi alireblas per la jena retligilo: <https://testo.vortaro.net/>

Kompreneble, tiu nova PIVo entenas multajn novajn kapvortojn kaj radikojn. Sed oni trovos ankaŭ, ke pluraj difinoj estis ŝanĝataj. Inter alie, ĝi ne plu difinas junulon kaj amikon kiel viro, kaj ĝi nun enhavas la maskligan sufikson iĉ. Aldone, ĝi nun subtenas riismon kaj malrekomendas ĝiismon. Do, bona ekirpunkto por ontaj disputoj! ;-)

Atentu
Tio ĉi estas *testa versio* de la *estonta* PIV. Restas multe por fari antaŭ ol ĝi povos fariĝi la oficiala versio. Uzu ĝin singarde.
[Klarigoj](#)
[PIV 2020](#)

Testa versio

Salti al PIV 2020

PIV

[Serĉi](#) [Foliumi](#) [filtr](#) ? [B](#) [S](#) [🔒](#) [👤](#) [prezento ▾](#)

[Ek](#)

[✓ kapvortoj](#) [✓ derivaĵoj](#) [☐ cetere](#) [☐ uskle](#) [Hazarda](#)

1 trafo en 1 artikolo

ri

ri

pronomo [referenco al persono sen precizigi ties sekson]:

◦ *ri* komencis prepari la koncernan juĝaferon jam en 2013, kiam la jurfirmao [...] akceptis *rin* kiel senpagan klienton ^{EGE}

◦ se oni vere allogiĝas al iu, tio ofte signifas, ke oni ankaŭ ŝatas kaj respektas *rin* kaj ne deziras al *ri* malbonon ^{KEr}

→ *li* ², *ĝi* ⁵.

Rim. 1 La pronomo **ri** estas neoficiala kaj ne estas ĝenerale akceptita. Ĝi estis unufoje proponita en 1976. Ĝis ĉirkaŭ 2010 ĝi restis malofte uzata eksperimentaĵo, sed post 2010 ĝia uzado signife pliiĝis, ĉefe en junularaj rondoj en Okcidentaj landoj.

Rim. 2 Iuj uzas la pronomon **ri** nur pri neduumaj homoj.

ri-a de *ri*:

◦ la petinto plejparte fajfis pri miaj korektoj, [...] kaj fine eĉ akuzis ke mi enpoŝigis *rian* honoraron ^{IEr}

ESPERANTO-INFORMILO

7